

1

# katolika sento

'74

anno 53°
u.e.c.i.

rm

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 53° - 1974**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO

nº 1

53a Jaro Januaro 1974

# "LA PACO DEPENDAS ANKAŬ DE VI"

(Mesaĝo de la Papo por "La tago de la paco 1974")

Aŭskultu min ankoraŭ, homoj alvenintaj al la sojlo de la nova jaro 1974a.

Aŭskultu min ankoraŭ: mi estas antaŭ vi por prezenti humilan petegon, energian petegon.

Kompreneble, vi tion imagas, mi volas ankoraŭ paroli al vi pri la Paco.

Jes, pri la Paco. Verŝajne vi opinias koni ĉion koncerne la Pacon; pri tio ĉiuj jam parolis multe. Probable ĉi tiu invada nomo provokas senton de sateco, de enuo, eble eĉ de timo, ke ĝi kaŝas en la fascino de sia vorto iluzian magion, nominalismon jam trouzatan kaj retorikan kaj eĉ danĝeran sorĉon. La nuna historio, karakterizata je kruelaj epizodoj de internaciaj konfliktoj, je senkompataj klasbataloj, je eksplodoj de revoluciaj liberecoj, je subpremoj de la fundamentaj rajtoj kaj liberoj de la homo, kaj je subitaj simptomoj de tutmonda ekonomia nefirmeco, ŝajnas detrui, kvazaŭ ĝi estus la statuo de idolo, la triumfantan ideon pri la Paco. Al la vakua kaj poltrona nominalismo, kiun ĝi ŝajnas adopti en la eksperimentado politika kaj ideologia de ĉi tiu lasta tempo, nun denove oni preferas la realismon de la faktoj kaj de la interesoj, kaj oni repensas pri la homo kiel pri la eterna nesolvebla problemo de vivanta memkonflikto; la homo estas tia: estaĵo, kiu portas en la koro

la destinon de la interfrata lukto.

Fronte al ĉi tiu kruda renaskiĝanta realismo ni proponas ne nominalismon venkitan de novaj kaj perfortaj eksperimentoj, sed nevenkeblan idealismon, tiun de la Paco, destinitan al granda firmiĝo.

Kredu, homoj fratoj, homoj de bonvolo, homoj saĝaj, homoj suferantaj, je nia ripetita humila voĉo, je nia senlaca krio. La Paco estas la idealo de la homaro. La Paco estas necesa. La Paco estas deviga. La Paco estas avantaĝa. Ne estas ideo nelogika kaj fiksa, la nia; ĝi ne estas obsedo, iluzio. Ĝi estas certeco; jes, ĝi estas espero; ĝi havas por si la estontecon de la civilizo, la destinon de la mondo; jes, la Paco.

Ni estas tiel konvinkitaj, ke ĝi, la Paco, estas la alvenpunkto de la homaro survoje al konscio pri si kaj al civila evoluo sur la tersurfaco, ke hodiaŭ, por la nova jaro kaj por la estontaj jaroj, ni kuraĝas proklami, kiel ni jam faris pasintjare: la Paco estas ebla.

Ĉar, cetere, tio, kio kompromitas la solidecon de la Paco kaj la disvolviĝon de la historio favore al ĝi, estas la sekreta kaj skeptika konvinko, ke ĝi estas praktike neebla. Tre bela koncepto, oni pensas, ne dirante tion, bonega sintezo de la homaj aspiroj; sed sonĝo poezia, utopio trompa. Drogo ebriiga, sed malfortiga. Ĝi ankoraŭ reviviĝas en la spiritoj kiel neevitebla logiko: tio, kio valoras, estas la forto; la homo reduktos plejeble la komplekson de la fortoj al la ekvilibro de ilia kontraŭstaro, sed la homa organizo ne povas preterlasi la forton.

Ni devas halti momenton ĉe ĉi tiu ĉefa objeto por solvi eblan miskomprenon, tiun, kiu konfuzas la Pacon kun la malforto ne nur fizika sed morala, kun la rezigno pri la vera rajto kaj pri la honesta justeco,

# KATOLIKA SENTO

n° 1

53a Jaro Januaro 1974


"LA PACO DEPENDAS ANKAŬ DE VI"
(Mesaĝo de la Papo por "La tago de la paco 1974")

Aŭskultu min ankoraŭ, homoj alvenintaj al la sojlo de la nova jaro 1974a.

Aŭskultu min ankoraŭ: mi estas antaŭ vi por prezenti humilan petegon, energian petegon.

Kompreneble, vi tion imagas, mi volas ankoraŭ paroli al vi pri la Paco.

Jes, pri la Paco. Verŝajne vi opinias koni ĉion koncerne la Pacon; pri tio ĉiuj jam parolis multe. Probable ĉi tiu invada nomo provokas senton de sateco, de enuo, eble eĉ de timo, ke ĝi kaŝas en la fascino de sia vorto iluzian magion, nominalismon jam trouzatan kaj retorikan kaj eĉ danĝeran sorĉon. La nuna historio, karakterizata je kruelaj epizodoj de internaciaj konfliktoj, je senkompataj klasbataloj, je eksplodoj de revoluciaj liberecoj, je subpremoj de la fundamentaj rajtoj kaj liberoj de la homo, kaj je subitaj simptomoj de tutmonda ekonomia nefirmeco, ŝajnas detrui, kvazaŭ ĝi estus la statuo de idolo, la triumfantan ideon pri la Paco. Al la vakua kaj poltrona nominalismo, kiun ĝi ŝajnas adopti en la eksperimentado politika kaj ideologia de ĉi tiu lasta tempo, nun denove oni preferas la realismon de la faktoj kaj de la interesoj, kaj oni repensas pri la homo kiel pri la eterna nesolvebla problemo de vivanta memkonflikto; la homo estas tia: estaĵo, kiu portas en la koro

la destinon de la interfrata lukto.

Fronte al ĉi tiu kruda renaskiĝanta realismo ni proponas ne nominalismon venkitan de novaj kaj perfortaj eksperimentoj, sed nevenkeblan idealismon, tiun de la Paco, destinitan al granda firmiĝo.

Kredu, homoj fratoj, homoj de bonvolo, homoj saĝaj, homoj suferantaj, je nia ripetita humila voĉo, je nia senlaca krio. La Paco estas la idealo de la homaro. La Paco estas necesa. La Paco estas deviga. La Paco estas avantaĝa. Ne estas ideo nelogika kaj fiksa, la nia; ĝi ne estas obsedo, iluzio. Ĝi estas certeco; jes, ĝi estas espero; ĝi havas por si la estontecon de la civilizo, la destinon de la mondo; jes, la Paco.

Ni estas tiel konvinkitaj, ke ĝi, la Paco, estas la alvenpunkto de la homaro survoje al konscio pri si kaj al civila evoluo sur la tersurfaco, ke hodiaŭ, por la nova jaro kaj por la estontaj jaroj, ni kuraĝas proklami, kiel ni jam faris pasintjare: la Paco estas ebla.

Ĉar, cetere, tio, kio kompromitas la solidecon de la Paco kaj la disvolviĝon de la historio favore al ĝi, estas la sekreta kaj skeptika konvinko, ke ĝi estas praktike neebla. Tre bela koncepto, oni pensas, ne dirante tion, bonega sintezo de la homaj aspiroj; sed sonĝo poezia, utopio trompa. Drogo ebriiga, sed malfortiga. Ĝi ankoraŭ reviviĝas en la spiritoj kiel neevitebla logiko: tio, kio valoras, estas la forto; la homo reduktos plejeble la komplekson de la fortoj al la ekvilibro de ilia kontraŭstaro, sed la homa organizo ne povas preterlasi la forton.

Ni devas halti momenton ĉe ĉi tiu ĉefa objeto por solvi eblan miskomprenon, tiun, kiu konfuzas la Pacon kun la malforto ne nur fizika sed morala, kun la rezigno pri la vera rajto kaj pri la honesta justeco,

kun la forkuro el la risko kaj el la sinofero, kun la rezignacio timema kaj submetita al aliula superregado, kaj tial akceptanta propran sklavecon. Ne estas ĉi tiu la aŭtentika Paco. Subpremo ne estas Paco. Pigreco ne estas Paco. Ordo nur ekstera kaj altrudita de la timo ne estas Paco. La freŝdata celebrado de la 25a datreveno de la Deklaro pri la Homrajtoj memorigas al ni, ke la vera Paco devas baziĝi sur la sento de la netuŝebla digno de la homa persono, el kie eliĝas nepre respektendaj rajtoj kaj respondaj devoj.

Estas ja vere, ke la Paco akceptos obei la justan leĝon kaj la juran aŭtoritaton, sed ĝi neniam estos fremda al la racio de la komuna bono kaj al la morala homa libero. La Paco povos alveni ankaŭ al gravaj rezignoj en la konkuro de la prestiĝo, en la kuro al la armado, en la forgeso de la ofendoj, en la liberigo je la ŝuldoj; ĝi alvenos eĉ al la grandanimeco de la pardono kaj de la repaciĝo; sed neniam por servuta marĉando de la homa digno, neniam por protekto de propra egoisma intereso malprofite por la aliula rajta intereso, neniam pro poltroneco; ĝi neniam ekzistos sen la malsato kaj la soifo de la justeco; ĝi neniam forgesos la penon necesan por protekti la malfortulojn, por helpi la malriĉulojn, por defendi la aferon de la humiluloj; ĝi neniam perfidos, por vivi, la superajn kialojn de la vivo. (Jo. 12,25).

Tamen la Paco ne devas esti konsiderata utopio. La certeco de la Paco ne konsistas nur en la esto, sed ankaŭ en la estiĝo. Kiel la vivo de la homo, ĝi estas dinamisma. Ĝia regno etendiĝas ankoraŭ kaj ĉefe en la deontologia kampo. Tio estas en la sfero de la devoj. La Pacon oni devas ne nur konservi, sed produkti. La Paco estas kaj devas esti, pro tio, survoje al kontinua kaj gradà firmiĝo. Ni eĉ diros: la Paco estas ebla, nur se ĝi estas konsiderata kiel devo.

Ne sufiĉas, ke ĝi estas starigita sur la konvinko, kutime tre justa, ke ĝi estas avantaĝa. Ĝi devas eniri en la konscion de la homoj kiel superega etika celo, kiel morala neceso, "ananke", elvenanta el la interna postulo de la homa kunvivado.

Ĉi tiu malkovro, ĉar tia ĝi estas en la pozitiva procezo de nia racieco, instruas al ni kelkajn principojn, de kiuj ni neniam plu devos deturniĝi. Kaj unue ĝi klarigas al ni la primitivan naturon de la Paco: ĝi estas antaŭ ĉio ideo. Ĝi estas interna aksiomo, trezoro de la spirito. La Paco devas ĝermi el fundamenta kaj spirita konceptado de la homaro; la homaro devas esti pacema, tio estas kunigita, kohera en si mem, solidara en la profundo de sia esto. La manko de ĉi tiu radika konceptado estis, kaj estas ankoraŭ, la profunda origino de la malfeliĉoj, kiuj afliktis la historion. Koncepti la lukton inter la homoj kiel strukturan postulon de la socio, ne konsistigas nur eraron laŭ filozofia vidpunkto, sed potencialan kaj konstantan krimon kontraŭ la homaro. La civilizo devas finfine sin liberigi de la antikva trompo, restanta kaj ĉiam aganta depost Kaino: "homo homini lupus". La nuna homo devas havi la kuraĝon moralan kaj profetan sin liberigi de ĉi tiu denaska krueleco, kaj alveni al la konkludo, kiu estas ĝuste la ideo pri la Paco, kiel esence natura, necesa, deviga kaj tial ebla. De nun oni devas koncepti la homaron, la historion, la laboron, la politikon, la kulturon, la progreson kun rilato al la Paco.

Sed kiom valoras ĉi tiu ideo, spirita, subjektiva, interna kaj persona; kiom ĝi valoras tiel senarmigita, tiel malproksima de la travivitaj okazaĵoj, efikaj kaj grandegaj, de nia historio? Dum la tragedia sperto de la lasta mondmilito laŭgrade forsvenas en la sferon de la memoraĵoj, ni devas, bedaŭrinde, konstati rekrudiĝon de rivaleca spirito inter la Nacioj kaj en

la politika dialektiko de la socio; hodiaŭ la potenco de milito kaj de lukto multe kreskis, ne malpliiĝis, kompare kun tiuj, kiujn la homaro disponis antaŭ la mondmilitoj. Ĉu vi ne vidas - povas objêti al ni iu ajn observanto -, ke la mondo iras al militoj pli teruraj kaj hororaj ol la hieraŭaj? Ĉu vi ne vidas la malgrandan efikon de la pacifisma propagando kaj la nesufiĉan influon de la internaciaj instituciaj stariĝintaj dum la konvalesko de la mondo sangokovrita kaj ellacigita de la mondmilitoj? Kien iras la mondo? Ĉu ĝi ne pretiĝas ankoraŭ al pli katastrofaj kaj abomenindaj militoj? Ve!ni devus mutiĝi antaŭ tiel premantaj kaj senkompataj rezonadoj, kvazaŭ antaŭ senespera destino!

Sed ne! Ĉu ankaŭ ni estas blindaj? naivaj? Ne, homoj Fratoj! Ni estas certaj, ke nia afero, tiu pri la Paco, devos venki. Unue, ĉar, malgraŭ la frenezaĵoj de la kontraŭa politiko, la ideo pri la Paco estas jam venkinta en la penso de ĉiuj respondecaj homoj. Ni konfidas al ilia moderna saĝeco, al ilia energia lerteco: neniu Estro de Popolo povas hodiaŭ voli la militon; ĉiuj aspiras al la ĝenerala Paco de la mondo. Tio estas grandaĵo! ni aŭdacas insiste petegi, ke ili neniam plu dementu sian, aŭ pli bone la komunan, programon pri Paco!

Due. Estas la ideoj, kiuj, pli ol, kaj antaŭ, la specialaj interesoj, gvidas la mondon, malgraŭ la kontraŭaj ŝajnoj. Se la ideo pri la Paco efektive gajnos la koron de la homoj, la Paco estos savita, aŭ, pli bone, ĝi savos la homojn. Estas superflue, dum ĉi tiu parolado, elspezi vortojn por pruvi la nunan potencon de la ideo fariĝinta penso de la Popolo, tio estas de la publika opinio; hodiaŭ ĝi estas la reĝino, kiu fakte regas la Popolojn; ĝia nepesebla influo ilin formas kaj gvidas; kaj estas poste la Popoloj, nome la publika opinio aganta, kiu regas la regantojn. Almenaŭ grand-

parte estas tiel.

Trie. Se la publika opinio iĝas koeficiento, kiu determinas la destinon de la Popoloj, la destino de la Paco dependas ankaŭ de ĉiu el ni. Fakte, ĉiu el ni estas membro de la civila korpo aganta kun demokrata sistemo, kiu en varia formo kaj en malsama mezuro karakterizas hodiaŭ la vivon de la Nacioj moderne organizitaj.

Tion ni volis diri: la Paco estas ebla, se ĉiu el ni ĝin volas; se ĉiu el ni amas la Pacon, edukas kaj formas sian pensmanieron al la Paco, defendas la Pacon, laboras por la Paco. Ĉiu el ni devas aŭskulti en sia konscienco la devigan alvokon "La Paco dependas ankaŭ de vi".

Certe la individua influo sur la publikan opinion povas esti nur tre malgranda; sed neniam vana. La Paco vivas de la aliĝoj, eĉ se individuaj kaj anonimaj, kiujn la personoj al ĝi donas. Kaj ni ĉiuj scias, kiel formiĝas kaj manifestiĝas la fenomeno de la publika opinio: firmiĝo serioza kaj forta facile disvastiĝas. La firmiĝo de la Paco de individua devas fariĝi kolektiva kaj komuna; ĝi devas fariĝi firmiĝo de Popolo kaj de la Komunumo de la Popoloj; konvinko, ideologio, agado; ĝi devas aspiri penetri la penson kaj la aktivecon de la novaj generacioj kaj invadi la mondon, la politikon, la ekonomion, la pedagogion, la estontecon, la civilizon. Ne pro instinkto de timo kaj de forkuro, sed per krea impulso de la nova historio kaj de la nova konstruo de la mondo; ne pro malagemo kaj pro egoismo, sed per fortikeco morala kaj per pliiĝinta amo al la homaro. La Paco estas kuraĝo, estas saĝeco, estas devo; kaj konklude ĝi estas, krome, intereso kaj feliĉo.

Tion ni kuraĝas diri al vi, homoj Fratoj; al vi, homoj de ĉi tiu mondo, se vi havas en la mano, pro

iu aŭtoritato, la direktilon de la mondo; homoj de registado, homoj de kulturo, homoj de negocoj: estas necese doni al via agado direkton fortikan kaj sagacan cele al la Paco; ĝi bezonas vin. Se vi volas, vi povas! La Paco dependas ankaŭ kaj speciale de vi.

++++++

Ni rezervos, krome, al niaj Kunfratoj de kredo kaj de karitato parolon ankoraŭ pli konfideman kaj pli premantan: ĉu ni ne havas eblecojn niajn, originalajn kaj superhomajn, per kiuj kunlabori kun la iniciatintoj de Paco por validigi ilian agadon, la komunan agadon, por ke Kristo kun ili, laŭ la beateco de la Evangelio, rekonu nin ĉiujn kiel filojn de Dio? (Mt. 5,9) Ĉu ni ne povas prediki la Pacon, antaŭ ĉio, en la konsciencoj? kaj kiu pli ol ni devas, per la parolo kaj per la ekzemplo, esti edukanto de Paco? Kiel, do, ni povos apogi la aferon de la Paco, en kiu la homa kaŭzeco atingas sian plej altan nivelon, se ne per nia enmetiĝo en la dian kaŭzecon, disponeblan al la alvokoj de niaj preĝoj? Kaj ĉu ni estos nesentemaj al la pacheredaĵo, kiun Kristo, nur Kristo, lasis al ni, vivantaj en mondo, kiu ne kapablas doni perfekta lian pacon transcendan kaj neesprimeblan? Ĉu ne povas ĝuste ni plenigi la petegon por la Paco per tiu humila kaj ama fortikeco, al kiu ne rezistas la dia mizerikordo? (Mt. 7,7; Jo. 14,27) Estas mirinde: La Paco estas ebla, kaj ĝi dependas ankaŭ de ni, per Kristo, nia Paco (Ef. 2,4).

Estu ĝia garantiaĵo nia paciga Apostola Beno.

Vatikano, la 8an de decembro 1973a

trad. L. M.

## DAL MONDO ESPERANTISTA

SCOUT. A Milano è stato organizzato un corso per giovani scout. Il corso si tiene presso la Parrocchia di S.Leone Magno, Via Carnia 24, 20132 Milano. E' frequentato da una quindicina di giovani entusiasti.

AMBURGO. Gli esperantisti hanno organizzato una esposizione per far conoscere l'esperanto ed il prossimo Congresso Universale che si svolgerà appunto ad Amburgo nel 1974. Essa è durata dieci giorni ed è stata visitata da circa 265 mila persone.

BONN. Il presidente della repubblica Tedesca, Gustav Heinemann ha ricevuto in udienza ufficiale una delegazione di esperantisti tedeschi, interessandosi dell'esperanto e dei suoi problemi.

LA NOBLA KORANO. E' deceduto a Francoforte il noto scrittore ed accademico esperantista dott. Italo Chiussi, traduttore del Corano ed autore di "Je la flanko de la profeto" in via di stampa.

DALL'AUSTRALIA. Il neoeletto deputato David Mackenzie, nel suo primo discorso alla Camera, ha sottolineato l'utilità e la necessità dell'esperanto nei rapporti internazionali.

GIOVENTÚ ESPERANTISTA. Münster (Germania Occidentale) sarà la sede del 30° Congresso Internazionale della Gioventù Esperantista (TEJO) che avrà luogo dal 4 al 10.8.1974.

FILM SU ZAMENHOF. Da Varsavia giunge notizia che è in allestimento un film televisivo su Zamenhof e la sua opera. Esso sarà realizzato sia in polacco sia in esperanto per la primavera del 1974. Sarà noleggiabile anche ad altri enti televisivi o a privati.

## ESPERANTISMO CATTOLICO.

MANUALE DI ESPERANTO. Durante l'ultima riunione del Consiglio dell'U.E.C.I. si è deciso di ristampare la nostra grammatica. A questo scopo si invitano tutti coloro che hanno usato il Manuale dell'U.E.C.I. ad inviare le loro critiche. E' nostra intenzione avere a disposizione una grammatica maneggevole, di poco costo, ma sempre migliore nel contenuto.
Le critiche vanno indirizzate al Tesoriere - Dr. Cesare Ferrari - Viale dei Mille 37 - 20129 Milano.

CORSI DI ESPERANTO. Continuando l'attività dello scorso anno, presso il FOM - Federazione Oratorii Milanesi - Via S. Antonio 5, sono stati istituiti due corsi di Esperanto, uno alle ore 19,30 del martedì, di II grado, ed uno alle ore 20,30 sempre di martedì, di I grado, per principianti.

CONGRESSO MONDIALE degli Esperantisti Cattolici avrà luogo ad Amburgo, una settimana prima del Congresso Universale dell'U.E.A. (Universala Esperanto Asocio). Seguiranno dettagli.

MOSAICO. Gli Esperantisti cattolici organizzeranno un pellegrinaggio in Terrasanta in concomitanza con qualche manifestazione esperantista del luogo. In quell'occasione sarà inaugurato per interessamento degli esperantisti cattolici, un pannello in mosaico. Seguiranno programmi.

LA FLOTTA AEREA POLACCA ha annunziato che sarà dato il nome di Zamenhof ad uno dei quattro suoi più grandi aerei in costruzione. Le hostesses di questo aereo dovranno seguire un corso di Esperanto.

ooooooooooooooooooooooooo

ROMA ESPERANTA VOĈO

n°124

·De la 9a ĝis la 12a de aŭgusto 1974 en Gostyn Poznanski okazos "Spiritaj ekzercoj - la religiaj tagoj por esperantistoj", por iom mediti, iom preĝi iom kanti -.
Ĉiuj estas kore invitataj.
La kostoj = 70 zl. por unu tago.
Vizitoj al Ĉenstoĥovo, Krakovo kaj Kalvario.
Profitu la esceptan okazon!

ALIĜIS AL KATOLIKA SENTO (Dua listo):
Mondoví-Breo: C.Battaglia; Napolo: T.Restaino; A. Jacobitti; Reggio Emilia; A.Fabbi; E.Paglia; L.Bedogni; L.Bossi; Rimini: D.Magnani; Romo: J. Christiaens; Z.Carrubba; M.Nanni; C.Maracchia; M.Canevari; N.Paglia; L.Macak; A.Scalia; Tenno-P(Tr) G.Paicher; Treviso; S.Boschin; Trento: A.Bessetti; Vicenza; G.Stocchiero; Aŭstrujo: F.Casar (2); K.Dürrschmid; Francujo: A.Augen; J.P.Trelluyer; L.Goudé; Germanujo: B.Rejnic; Wollbacher A.; Hungarujo: M.Vari; K.Skultety; Jugoslavio: H.Djuro; Nederlando: W.J.Visser; L.H.Brans; Pollando: B. Materna; Portugalujo: G.Pausback;
Entute: 174

Ek de ĉi tiu numero de nia revuo, ni ne povas promesi, ke ni sendos la venontajn al tiuj, kiuj ne abonis. Se vi aprecas nian revuon, rapidu do, aboni ĝin.

H.BENDA, la famkonata esperantista komponisto,aŭtoro de belegaj muzikaj verkoj en la Internacia Lingvo, sendis al ni ekzempleron de "Kristnasko-kanto de la Bonaj Infanetoj" je kvar voĉoj, tre taŭga por niaj esperantistaj grupoj.
Oni petu partiturojn kaj diskojn de la ĉarma kanto al: H.Benda - 66bis, Avenue de la Californie - 06 Nice Francujo.

---

## El la Katolika Eklezio

---

GRAVA EKLEZIA DOKUMENTO estis difinita la "Direktivaro por la meso kun partopreno de infanoj, disvastigita ekde la 20a de decembro pere de la Kongregacio por la Kulto. Fakte la dokumento estas trapenetrita de delikata pedagogia sento por iri renkonten al infanoj per la liturgio, same kiel oni klopodis malfermi la trezorojn de la liturgio al la tuta dia popolo pere de la uzado de la patrina lingvo. Ĉar la infanoj en sia ĉiutaga vivo celas kaj ĝojas similiĝi al prenkreskuloj,tiel oni memorigas ke la ĉefa celo de tiuj mesoj por infanoj devas esti ilia iom-post-ioma enkonduko en la meson de la tuta komunumo. Estas necese,ke la infanoj vidu la adoltojn kaj precipe sian familion, preĝi kune kaj esprimi la saman kredon.
La direktivaro pritraktas aparte la partojn de la meso, la lokon, la personojn, la manierojn de aktiva partopreno, la "gestojn", kantojn, muzikon, la silentajn momentojn, montrante la eblecojn de multaj adaptiĝoj al la komprenemo de la infanoj, sen danĝero de arbitraj novaĵoj. En pluraj kazoj oni transdonas al la eklezia aŭtoritato, al la episkopo aŭ al la episkopa konferenco la decidojn pri oportunaj ŝanĝiĝoj.

MEMORIGANTE SANKTAN NARSETON, Patriarkon de la Armenoj (1102-1173), en la 8a jarcenta datreveno de lia morto, p. Mesrobio Gianascian, mekitaristo, reeldonis la Sanktajn Himnojn (jam publikitajn en pli ol 30 lingvoj) de la Patriarko (S. Lazzaro - Venezia. Pag. 231).
Nersès 4a Pahlavuni (S. Narseto), estas elstara figuro en la armena popolo. Li gvidis la eklezion dum malfacila tempo, sub la principeco de Cilicio kaj multe zorgis por la ekumena unueco de la orientaj kristanaj eklezioj. Klardoktrina Teologo, aparte profunda en Kristologio kaj mariologio, li skribis kun saĝeco kaj prudento, humilo kaj dolĉeco, meritante la epiteton "Gracia". Poeto sentoplena kaj alta, li verkis historiajn poemojn, spiritajn kantojn kaj ĉefe sanktajn himnojn, indajn laŭ spirita sento, koncepto kaj liriko. partopreni en la universala trezoro de la kristana poezio.
S. Narseto skribis ilin por plenigi la mankojn de la Himnaro de la liturgia jaro. Al la breviero apartenas: "Leviĝu, miaj laŭdoj", verkita por la gardistoj de la patriarka kastelo de Hrom-klay; "Himno al tagiĝo" (pri kiu ni donas tradukon), por laŭdkanti la donanton de la matena lumo; "Plorkanto de pentanta animo", por la feriaj tagoj; "Himno al la Reviviĝo" por Matutino de ĉiuj jaraj dimanĉoj; "Himno al la lumo", kantata dum la ofico "Je leviĝo de la suno"; "Himno por trankvila nokto", "Kantiko al la kreado": himnoj por la sep semajnaj tagoj.
Al la Himnaro apartenas: "La poemo de la Sankta Vendredo; Himnoj de la Kanonoj de la ses karesmaj dimanĉoj; Himnoj de Pentekosto, de la Transfiguriĝo; al Maria ĉielenprenita, al la Martiroj de Avarayr; himnoj por la mortintoj. Apud la Sanktaj Himnoj estas la poemoj, kiuj havas pli liberan karakteron pri prezento de ideoj, formo kaj kelkfoje kun pli da lirika sento. Kel-




kaj el ili estas provizitaj ankaŭ je muziko.
La poezio de S.Narseto estas trapenetrita de alta teologia sento. La humaneco de la dia Vorto, tiom kortuŝa kaj amebla, estas la levilo de liaj aspiroj, de l'animo, de la admiro, kaj la pivoto de lia tuta lirika poezio.
La Vatikano memorigis tiun 8an jarcentan datrevenon ankaŭ per eldono de specialaj poŝtmarkoj, (27.11.'73) kies unuatagan koverton ni sendis, kiel kutime, al niaj abonintoj, poŝtmark-kolektantoj (v.la foton).(Aliaj preferas nestampitajn seriojn). La serio konsistis el tri valoroj sur tri malsamaj ekzempleroj. La 25- lira poŝtmarko reproduktas la preĝejon de S. Hripsime, roma virgulino martiriĝita en Armenujo.La 90-lira p.m. reproduktas karakterizan "khatchkar" armenan, ŝtona steleo kun kruco kaj devizo: "Venka Signo". La 180-lira p.m. montras la figuron de la sankta Patriarko, laŭ la tradicia aspekto transdonita de la armena miniatura tradicio. Ĉiuj havas sian indikon ankaŭ laŭ la armena skribmaniero.

# HIMNO AL TAGIĜO

Lumo de la tagiĝo,
suno de la justeco
hele brilu en mi!

Eliĝinte el Patro,
el mia kor' eligu
la vortojn akcepteblajn.

Leviĝu, ho Sinjoro;
min dormentantan veku,
por vigli kun anĝeloj.

Akceptu korfavore,
akceptu min indulge,
akceptema, Sinjoro.

Je l' brilo de la lumo,
ho tre sperta ŝipestro,
savu min ekdronantan.

Radio de la gloro
montru al mi la vojon
por ĉielen ascendi.

Renoviganta ĉion,
min ankaŭ renovigu
reornamante min.

Vi, kiu bonojn donas,
donu al mi pardonon,
donu la pentan senton.

Pri graco riĉa fonto,
al miaj ŝuldoj donu
vian plenan pardonon.

Per via korindulgo,
per la mizerikordo,
sanigu min, Sinjoro!

Kunigu, nia Majstro,
nin, vian disĉiplaron,
kun la ĉielsanktuloj.

Sankta Narseto

EKUMENISMO: Miksaj Komisionoj kaj iliaj unuaj unuaj rezultoj. (Kard. Willebrands)

La Dua Vatikana Koncilio komencis novan periodon en la rilatoj inter la katolika Eklezio kaj la Eklezioj aŭ ekleziaj komunumoj, kiuj ne plene komunikas kun ĝi. Kiel faris pri aliaj sektoroj, la Koncilio donis direktivojn

ankaŭ en la ekumena kampo pri la evoluo de la teologio kaj de la kristana niatempa vivo. La patroj de la koncilio ne estis sen preparo antaŭ la problemoj kaj la postuloj de la ekumena movado, kiu jam de kelkaj jardekoj kreskis kaj disvolviĝis inter niaj ortodoksaj, anglikanaj kaj protestantaj fratoj, en kiuj partoprenis pli kaj pli katolikaj teologoj kaj paŝtistoj. En la koncilio la episkopoj skizis sub la lumo de la evangelio kaj la asisto de la Sankta Spirito, direktivojn, kiujn gvidos la Eklezion en ĝiaj klopodoj por "akceli la reunuiĝon inter ĉiuj kristanoj" (Unitatis Redintegratio,N.1). Inter la rimedoj, kiuj devas servi al la sankta celo de la unuigo, la koncilio menciis, krom la interna konverto kaj la preĝado, ankaŭ la dialogon. La koncilio parolis pri la metodo kaj la spirito de la ekumena dialogo (Un.Redint.N.11) kaj rekomendis en aparta kazo ĝian objekton: "Estas necese,-ĝi deklaris - ke sur la doktrino de la lasta vespermanĝo de Jesuo, sur la sakramentoj,la kulto kaj la oficoj de la Eklezio, baziĝu la dialoga objekto" (Un.Redint.N.22). Pro tio kaj pri ĉi tiuj temoj stariĝis teologia dialogo inter kristanoj.

Post la koncilio, la Sekretariato por Unuigo de Kristanoj organizis la dialogon kun la multaj kristanaj konfesioj, devenintaj de la Reformacio, aparte kun anglikanoj, luteranoj, reformitoj kaj metodistoj. Unue estis kreitaj preparaj komisionoj por precizigi la liston de la diverĝoj en la kredo, kaj poste por selekti, "laŭ hierarkio de la veroj" (Un.Redint.N.11), la temojn de la doktrinaj diferencoj, kiuj rilatas la kristanan vivon, la aspektojn de la kulto, la praktikon de la sakramentoj , la kristanan moralon kaj, ĝenerale, la animzorgan agadon.

La selekto de la fundamentaj temoj estis inspirata el la specifaj diferencoj ekzistantaj inter la kristanaj konfesioj. Tiel, por la dialogo katolika-luterana,estis e-

lektita la temo: "Evangelio kaj Eklezio"; por la dialogo katolika-anglikana, la serio: "Eŭkaristio, Sacerdota ofico, Aŭtoritato". En la kadro de la dialogo kun luteranoj, pri la temo "Evangelio kaj Eklezio" estis pristudata la doktrino de la justiĝo, kiu de luteranoj estas ĉiam centra aspekto por kompreni la evangelion, dum rilate la problemaron pri la Eklezio (kiu tamen ankoraŭ ne ricevis la necesan profundigon) estis pritraktaj la temoj de l'Eŭkaristio, de la sacerdota ofico kaj de la aŭtoritato. En la dialogo katolika-anglikana ĝis nun estis pristudataj nur la unuaj du partoj: "Eŭkaristio kaj sacerdota ofico" de la fiksita programo.
Tiel ni jam atingis la unuajn rezultojn de la teologia dialogo. Mi - skribas la kardinalo - aludas unue kaj ĉefe al rezultoj de internaciaj komisionoj, kreitaj de la Sekretariato por Unuigo de Kristanoj, kiu elektis siajn katolikajn membrojn. Kelkaj el ĉi tiuj komisionoj estis kreitaj de la loka hierarkio, aliaj tamen estas frukto de privataj iniciatoj, kelkfoje indaj je granda estimo. Ĉi tiuj, nek pri sia ekzisto nek pri la laboro dependas de la supera instanco. Iliaj membroj agadas sub ekskluzivaj respondecoj de kristanoj kaj teologoj. Kelkaj el ili gardis ian rilaton kun hierarkio; aliaj laboras tute sendepende de ekleziaj paŝtistoj, kaj publikas la rezultojn de siaj laboroj ne antaŭinformante la aŭtoritatojn. Ĉi tiu procedo povas provoki reagon de la aŭtoritato, precipe kiam ĝi timas pri danĝero de novaj doktrinoj aŭ pri la disvastigo, kiun oni donas al ili.
En ĉi tiu artikolo - daŭrigas la kardinalo - ni mencias nur la rezultojn de la Miksaj Internaciaj Komisionoj oficiale starigitaj.
Post kelkaj jaroj da laboro, kelkaj el ĉi tiuj komisionoj atingis konkludojn publikitajn per komuna dokumento. Ĉi tiuj nomiĝas "Deklaro" aŭ "Akordo" aŭ simple "Raporto" kaj estas publikataj sub la nomo kaj respondeco de

tiuj komisionoj. Ili estas subskribitaj de iliaj prezidantoj aŭ de ĉiuj iliaj membroj. Ĉi tiuj dokumentoj ofte altiris vigle la atenton de sacerdotoj kaj de fideluloj. La fakto, ke ili esprimas akordon inter reprezentantoj de diversaj Eklezioj estas tre interesa kaj ĝoja afero. Oni estas ankaŭ pli facile impresita de la pozitiva parto, ol de la mankoj aŭ de eblaj aŭ realaj difektoj. Kelkfoje estiĝis ia konfuzo en la spirito de iuj; kelkfoje ĉi tiuj dokumentoj estis utiligataj por eltiri konsekvencojn, kiuj ne estis pravigitaj nek intencitaj de iliaj aŭtoroj.
Ĉi-okaze ŝajnas necesaj kelkaj principaj konsideroj. Oni povus demandi: Ĉu ni estas antaŭ novaj dokumentoj de la instrua Eklezio, kiuj pravigu aliigon en la paŝtista agado aŭ en la eklezia disciplino? Nu, ne estas dubo, ke ĉi tiuj komisionoj, eĉ tiuj, kiuj estas oficiale starigitaj, ne estas organoj de la eklezia instrurajto, kaj iliaj akordoj ne havas la aŭtoritaton de la ekleziaj deklaroj. La konkludoj, kiujn atingis la interkonfesiaj komisionoj restas ankoraŭ sub la aŭtoritato de tiuj, kiuj ilin formulis. La fakto, ke ili estas publikitaj, nenion aldonas al ilia naturo aŭ al ilia aŭtoritato. Ili estas nek deklaroj de la katolika Eklezio, nek de la Eklezioj aŭ ekleziaj komunumoj, kiuj decidis la dialogon. Ili rajtigas neniun aliiĝon de la aktuala eklezia disciplino.
Kvankam tiuj dokumentoj ne estas deklaroj de la Katolika Eklezio aŭ de aliaj konfesioj, kun kiuj ni ekdialogis, ili tamen reprezentas etapon en la teologia esploro, pri kiu zorgis la samaj eklezioj aŭ komunumoj je la servo de la unueco.
La priresponda publikigo de ĉi tiuj dokumentoj, kun en konduko, kiu klarigas ilian naturon kaj gravecon en la vivo de la Eklezio, estas evidente preferinda al disvastigo aŭ publikigo el privataj fontoj, ofte tendencaj, aŭ kiuj klopodas doni nur sensaciaĵojn. La publikigo, ce-

tere, stimulas pluan profundigon de la pozitivaj rezultoj atingitaj en ĉi tiu serioza ekumena priserĉado kaj riparon de eventualaj mankoj. Pro tio - avertas kardinalo Willebrands - la Sekretariato por Unuigo de Kristanoj ricevos dankeme la reagojn kaj la konsiderojn de la ekleziaj paŝtistoj kaj de teologoj. Ĉi tiuj konsideroj povos esti tre utilaj por la laboro de la interesitaj komisionoj. La Sekretario transdonos ilin al la komisiono, kiu serioze pristudos ilin, kune kun la aliaj rimarkoj, kiuj eventuale venos el la alia dialoganta parto. Tiel la komisiono kapablos plibonigi la rezulton de la unua laborfazo.

Sekve, la komisionoj kompletigos sian laboron nur post nova ekzameno, antaŭvide de definitiva redaktado de la konkludoj. Ĉi-momente, se la ekleziaj aŭtoritatoj prijuĝos oportune, ili povos interveni kaj oficiale sin deklari. Kaj estas klare, ke antaŭ la deklaro, kiun decidos la eklezia aŭtoritato, neniu rajtas eltiri el dokumento eldonita de studkomisiono, konkludojn aŭ normojn, kiuj aliigus la eklezian disciplinon.

La Sekretariato por Unuigo de Kristanoj esperas, ke la teologia dialogo daŭros kaj fruktos. La teologio havas gravan taskon por klarigi la diverĝojn inter kristanoj kaj solvi ilin je la lumo de la kredo. Ni dankas tiujn teologojn, kiuj oferas siajn energiojn kaj tempon. La fruktodonan daŭron de la dialogo dependas grandparte de iliaj klopodoj, sed ankaŭ de la saĝeco, per kiu la kristana popolo scias akcepti kaj pritaksi la rezultojn.

La pacienco -konkludas la kardinalo- estis difinita la plej esenca ekumena virto. La pacienco donas al ni la forton en la suferoj, kiujn ni eltenas kaŭze de la disiĝoj. Ĝi ne konas malkuraĝiĝojn, kaj strikte kuniĝas al konstanco, kiu daŭrigas senĉese niajn klopodojn por la revenigo al la eklezia unueco de ĉiuj, kiuj kredas je Kristo, la Sinjoro. Kaj la espero incitas agadon je ser

vo de unuiĝo: "Espero ne trompas" (Rom.5,5),ĉar ĝi baziĝas sur la sacerdota preĝo de Kristo: "Ke ĉiuj estu unu, kiel vi estas en mi, Patro, kaj mi en vi;ke ili ankaŭ estu unu en ni, por ke la mondo kredu,ke vi sendis min". (Joh.17:21).

LA VIGLA PARTOPRENO de la Sankta Seĝo per siaj plej kvalifikitaj reprezentantoj, en ĉiuj internaciaj kongregacioj, kunvenoj kaj similaj,entreprenitaj de internaciaj organizoj favore al progreso de la socio, internaciaj rilatoj, ktp. estas dokumentitaj en la kalendaro de la ĵus pasinta jaro, aperinta en "L'Osservatore Romano" de 5-1-74 per la sinteza priskribo de 160 tiaj delegitaĵoj. Tiel la Eklezio intencas doni sian kunlaboron por justeco, bazo de la paco, aplikante konkretmaniere tion, kion ĝi proklamas en la mondo en la nomo kaj laŭ la vorto de Kristo.

OKTOBRE DE LA VENONTA JARO okazos en Romo simpozio de la eŭropa episkoparo. Ĝia temo estos:"la misio de la episkopoj je servo de la kredo".Tiu de Romo estos la tria renkontiĝo de episkopoj laŭ eŭropa nivelo. Malvasta komitato zorgos pri la preparo de la simpozio, kiu antaŭvideble ne atingos tamen la nombron de la partoprenintoj en Noordwijkerhout kaj en Coira. La komitato devos precizigi la naturon, la celon kaj eĉ la disvolviĝon de la diskutoj, por eviti kelkajn embarasojn, kiuj montriĝis en Nederlando je 1967 kaj eĉ pli en Svisujo post du jaroj. El la preparaj laboroj faritaj per la tria asembleo de la konsilio de la episkopaj eŭropaj konferencoj (CCEE), evidentiĝis ankoraŭfoje la grava rolo, kiun la kristanaj eklezioj povos ludi, je la spirita vidpunkto, por la konstruo de Eŭropo. Sed tio supozas pli intiman kunlaboron inter la eklezioj mem. En ĉi tiu kadro akiras signifon la decido pri tria oficiala kunveno en la proksi-

ma februaro inter reprezentantoj de CCEE kaj delega cio de la konferenco de la nekatolikaj eŭropaj eklezioj en Ĝenevo.

La plena asembleo de CCEE, kiu kunvenos denove en oktobro, faris jam novajn paŝojn sur la vojo de kunlaboro inter la eŭropaj episkopaj konferencoj. Tion atestas la aprobo de la statuto post la dujara eksperimento, kaj eĉ pli la decido de la konferencoj informi sin reciproke pri la preparoj al la Episkopa Sinodo kaj pri la organizadoj por la Sankta Jaro. La asembleo de CCEE reprezentis, fine, favoran okazon por veki la konsciencon de la eŭropaj eklezioj favore al la Tria Mondo, kiu pro la petrolproblemo, kiu trafis multajn eŭropajn ŝtatojn, ricevos gravan kontraŭfrapon.

LA ROLO DE LA KANONA leĝo en la vivo de la Eklezio estis la centro de la parolado, kiun la Papo adresis je la 14a de decembro al la partoprenantoj en la3a kurso de la kanona nuntempigo por juĝistoj, laŭ iniciato de la Gregoria universitato. Li volis unue substreki, ke tiu klopodo por profundigi la konon de la eklezia leĝo, donas efikan helpon al la Eklezio, ĝuste dum ĝi renovigas sian propran leĝaron, por akceli la kristanan vivon laŭ la direktivoj de la 2a Vatikana Koncilio.

Paŭlo 6a diris, ke li ne ignoras la kontraŭajn opiniojn kaj la antaŭjuĝojn rilate la ekziston mem de la kanona juro. Fakte multaj, laŭdegante la liberecon, la karitaton, la rajtojn de la homa persono, la karisman karakteron de la eklezio, ĝis tie iras, ke ili rigardas malŝate la kanonajn instituciojn, ilin malvalorigas kaj spitas. Eĉ, ili volus detrui ilin, kvazaŭ ĉi tiuj estus"struskturoj" truditaj de ekstere, kiuj bremsus la spiritan karakteron de la evangelia mesaĝo, sufokante la liberecon, pri kio devas ĝui la filoj de Dio. El ĉi tio devenas kontraŭemo al ĉiu ajn laŭleĝa povo, kaj oni opini-

as, ke tion intencis la Dua Vatikana mem... Sed la Koncilio ne forpuŝis la kanonan juron - deklaris kun forto la Papo. Sendube la unua rango apartenas al la karitato; sed sen justeco, kiu estas esprimata per la leĝoj, ankaŭ la karitato ne povus ekzisti".

OKAZE DE LA 25jara datreveno de la Universala Deklaro pri la Homaj Rajtoj (10.12.1948), en kiu kelkaj novaj ŝtatoj aldoniĝis al la listo de la subskribintoj, aperis kuna komuniko de la katolika Organizo "Justitia et Pax" kaj de la "Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj" protestantaj. Agnoskante, ke la grava dokumento de UNO vekis la konsciencojn, kiuj pli kaj pli fariĝis dum nia tempo postulemaj pri la homaj rajtoj, la komuniko admonas, ke tiu dokumento, unu el la plej gravaj atingoj de nia civilizo, estas tamen homa produkto, kiu respegulas la postulojn de nia epoko, sed kiu donas esperon pri sia progreso kaj perfektiĝo. La dokumento sin turnas al la kristanoj, kiuj devas kunlabori, servante al Jesuo, kiun ili agnoskas vivanta en ĉiu sia frato kun tiu sama plena sindediĉo, kiun Jesuo mem havis por nia savo.

LA 2an DE JANUARO aperis la poliglota Vatikana eldonaĵo: "Pontifika Jarlibro-1974" kaj la "Statistika Jarlibro de la Eklezio - 1971. La ĉijara Pontifika Jarlibro konsistas el 1950 paĝoj, 30 pli ol la jarlibro de 1973. El supraĵa rigardo rezultas jenaj indikoj: 135 membroj de la Sankta Kolegiaro; 2198 rezidaj episkopaj sidejoj kaj 1983 titolaj; 102 Prelatujoj, 22 Abatejoj "nullius". 11 Apostolaj Administracioj, 84 Vikariejoj, 67 Prefektujoj, 4 Misioj "sui juris", 26 militistaj Vikariejoj kaj 97 Episkopaj Konferencoj. En la 1972 jaro estis kreitaj 18 episkopaj katedroj; du episkopaj estis altrangigitaj al metropolitaj kaj du al ĉefepiskopaj; unu abatejo al Diocezo. Krome estis starigitaj 5 apostolaj prefek-

tujoj, estis kreitaj 31 kardinaloj kaj elektitaj 151 epis kopoj aŭ ĉefepiskopoj. En la sama tempo mortis 12 pur puruloj kaj 109 episkopoj. La S. Seĝo rilatiĝis per novaj diplomataj traktatoj kun Aŭstralio, Novzelando, Voltlando kaj Cipro. El la ĉijara jarlibro rezultas 204 viraj religiaj institutoj kun papa rajto kaj 1190 virinaj. Inter la aliaj indikoj donitaj de la volumo ni memorigas 47 katolikajn Universitatojn, 23 fakultatojn por eklezian studoj kaj 32 teologiajn fakultatojn apud Ŝtataj Universitatoj.

"MARIA EN LA KORANA MESAĜO" estas la titolo de ĵus aperinta verko de Nilo Geagea (Eld. Teresianum - S. Pancrazio, 5 - Roma; 188 pag.) Ĝi prezentas diligentan kaj konvinkan studon, kiu celas doni kontribuaĵon al kunlaboro inter kristanoj kaj muzulmanoj por la akcelo de la religia movado, pere de la alloga figuro de virgulino Maria.
Kun paŝtista celo la 2a Vatikana Koncilio favoris kunvivadon inter kristanoj kaj muzulmanoj. Ankaŭ en la maria sektoro Islamo larĝe akordiĝas kun Kristanismo. Sekvante la Koranon, ĝi salutas en Maria la plej altan virinon en la mondo: virino elstare favoratan, patrino-virgulino pura kaj sankta, al Dio obeema, modelo pri kredo, pieco kaj pureco. Male de la pesimismaj antaŭvidoj de Hanna Zakarias, Maria restas brila konverĝa punkto inter Islamo kaj Kristanismo. Kaj, kiel estis oportune akcentite de la rektoro de la Muzulmana Instituto en la Pariza Moskeo, Ŝejko Hamza Boubakeur, la Sankta Virgulino kaj ŝia filo Jesuo interesas samtempe, kvankam laŭ malsamaj starpunktoj kristanojn kaj muzulmanojn; kaj ĉiufoje kiam estas pridubata la sankteco de la Virgulino-Patrino, "La muzulmano sin sentas ŝokita en siaj konvinkoj kaj ŝancelita en sia kulto al la Virgulino".

Maria "estas kara al la du plej grandaj religioj inspiritaj en la mondo, Kristanismo kaj Islamismo", asertas Geagea.

FRATA RENKONTIĜO inter la Sicilia eklezio kaj Rusa-ortodoksa delegacio. Ankaŭ la rusa ortodoksa eklezio agnoskas al Sicilio unuarangan ekumenan rolon; rolon, kiu al ĝi apartenas pro ĝiaj tradicioj kaj ĝia geografia pozicio. Ĉi tiu estas senco de la pilgrimado de grupo da rusaj episkopoj al la Palerma eklezio.
La delegacio, gvidata de mons. Vladimiro Dimitrof, rektoro de la teologia Akademio kaj de la moskva seminario, alvenis la 19an de decembro al Punta Paisi, venanta de Romo, kie ĝi renkontiĝis kun Papo Paŭlo 6a kaj kun la membroj de la Kristana Unuiĝo. Ĝin akceptis en la Sicilia insulo la Palerma ĉefepiskopo, kard. Pappalardo, la episkopo de Piana de la Albanoj, mons. Perniciaro kaj multnombraj reprezentantoj de la loka klerikaro.
La plej varma saluto inter la du eklezioj, ĝis nun disigitaj, tiel okazis en la atendsalono de la flughaveno, kvazaŭ temus pri fratoj, kiuj renkontiĝis post longa kaj deviga foresto. Estis ĉefe danka brakumado.
La sicilia eklezio estas dankema, ĉar la rusaj ortodoksuloj estas la plej avancintaj sur la ekumena vojo, ĉefe rilate la teologian dialogon; la ortodoksuloj siaflanke agnoskas, ke Sicilio donas konstantan kontribuaĵon al la kaŭzo de unuiĝo de ĉiuj kristanoj, sin bazante ĉefe sur homaj rilatoj kaj favorante renkontiĝon kun la popolo. Ĝuste laŭ ĉi tiuj du paralelaj vojoj marŝas ekumenismo ekde la 2a Vatikana Koncilio. Du malfacilaj vojoj, precipe la unua, kiu devas kalkuli pri la ne malgrandaj diferencoj, kiuj disigas ankoraŭ la kristanajn ekleziojn. La programo de religiaj kunvenoj, de vizitoj, de studoj pri problemoj an-

kaŭ sociaj, komunaj al la du popoloj, estis tre intensa.

LA UNUA SEKVANTO de "abbé Pierre" (pastro Petro) en la komunumo "Emauso" estis iu kiu murdis sian patron kaj eĉ celis memmortigon: rubaĵo neniel plu utiligebla, laŭ la bonmora socio; kaj ankaŭ por la tiama deputito, dediĉita al konstruo de "neleĝaj" loĝejoj favore al malriĉuloj, tiu senespera homo estis nur iu, kiu havis neniun vivocelon. Male, ĉi tion donis al li abbé Pierre, kaj tiel naskiĝis antaŭ 24 jaroj la komunumo Emauso, konsistanta hodiaŭ el 90 grupoj, kiuj agadas en 28 ĉiukontinentaj landoj.
Abbé Pierre, iam Henriko Groues, vizitante je la 16a de decembro Milanon, havis en la sidejo de PIME preskonferencon, por ilustri la celojn kaj la karakterizojn de la movado de li fondita. Estas konate, de kie Emauso eltiras rimedojn por siaj jam pluraj realigoj: la baza laboro de la "compagnons" (la "kamaradoj") konsistas en kolekto, rebonigo kaj revendo de ĉiu materialo, kiun la sata socio forĵetas kaj rifuzas. La mono per tio gajnita utilas al konstruo de loĝejoj por senhejmuloj, al agrikulturaj centroj, profesiaj lernejoj, institutoj por handikapatoj. Iom ŝerce, sed ne tro multe, abbé Pierre akcentis, ke liaj "chiffoniers" (ĉifonkolektistoj) plenumas ankaŭ kontraŭpolucian agadon, kiun oni povas nomi ekologian; almenaŭ en Francujo, kie ili estas tre nombraj.
La Emausaj komunumoj estas absolute nekonfesiaj: multaj el iliaj membroj apartenas al protestantaj sektoj aŭ al muzulmana religio. Tiuj, kiuj sin dediĉas plene al la komunumo estas kutime fraŭloj, sed abundas ankaŭ viroj kun edzino kaj filoj. La aktiveco de abbé Pierre nek estas, nek volas esti politika. Politika celo - laŭ lia deklaro, marŝas sur tute alia vojo.

Maria "estas kara al la du plej grandaj religioj inspiritaj en la mondo, Kristanismo kaj Islamismo", asertas Geagea.

FRATA RENKONTIĜO inter la Sicilia eklezio kaj Rusa-ortodoksa delegacio. Ankaŭ la rusa ortodoksa eklezio agnoskas al Sicilio unuarangan ekumenan rolon; rolon, kiu al ĝi apartenas pro ĝiaj tradicioj kaj ĝia geografia pozicio. Ĉi tiu estas senco de la pilgrimado de grupo da rusaj episkopoj al la Palerma eklezio.
La delegacio, gvidata de mons. Vladimiro Dimitrof, rektoro de la teologia Akademio kaj de la moskva seminario, alvenis la 19an de decembro al Punta Paisi, venanta de Romo, kie ĝi renkontiĝis kun Papo Paŭlo 6a kaj kun la membroj de la Kristana Unuiĝo. Ĝin akceptis en la Sicilia insulo la Palerma ĉefepiskopo, kard. Pappalardo, la episkopo de Piana de la Albanoj, mons. Perniciaro kaj multnombraj reprezentantoj de la loka klerikaro.
La plej varma saluto inter la du eklezioj, ĝis nun disigitaj, tiel okazis en la atendsalono de la flughaveno, kvazaŭ temus pri fratoj, kiuj renkontiĝis post longa kaj deviga foresto. Estis ĉefe danka brakumado. La sicilia eklezio estas dankema, ĉar la rusaj ortodoksuloj estas la plej avancintaj sur la ekumena vojo, ĉefe rilate la teologian dialogon; la ortodoksuloj siaflanke agnoskas, ke Sicilio donas konstantan kontribuaĵon al la kaŭzo de unuiĝo de ĉiuj kristanoj, sin bazante ĉefe sur homaj rilatoj kaj favorante renkontiĝon kun la popolo. Ĝuste laŭ ĉi tiuj du paralelaj vojoj marŝas ekumenismo ekde la 2a Vatikana Koncilio. Du malfacilaj vojoj, precipe la unua, kiu devas kalkuli pri la ne malgrandaj diferencoj, kiuj disigas ankoraŭ la kristanajn ekleziojn. La programo de religiaj kunvenoj, de vizitoj, de studoj pri problemoj an-

kaŭ sociaj, komunaj al la du popoloj, estis tre intensa.

LA UNUA SEKVANTO de "abbé Pierre" (pastro Petro) en la komunumo "Emauso" estis iu kiu murdis sian patron kaj eĉ celis memmortigon: rubaĵo neniel plu utiliĝebla, laŭ la bonmora socio; kaj ankaŭ por la tiama deputito, dediĉita al konstruo de "neleĝaj" loĝejoj favore al malriĉuloj, tiu senespera homo estis nur iu, kiu havis neniun vivocelon. Male, ĉi tion donis al li abbé Pierre, kaj tiel naskiĝis antaŭ 24 jaroj la komunumo Emauso, konsistanta hodiaŭ el 90 grupoj, kiuj agadas en 28 ĉiukontinentaj landoj.
Abbé Pierre, iam Henriko Groues, vizitante je la 16a de decembro Milanon, havis en la sidejo de PIME preskonferencon, por ilustri la celojn kaj la karakterizojn de la movado de li fondita. Estas konate, de kie Emauso eltiras rimedojn por siaj jam pluraj realigoj: la baza laboro de la "compagnons" (la "kamaradoj") konsistas en kolekto, rebonigo kaj revendo de ĉiu materialo, kiun la sata socio forĵetas kaj rifuzas. La mono per tio gajnita utilas al konstruo de loĝejoj por senhejmuloj, al agrikulturaj centroj, profesiaj lernejoj, institutoj por handikapatoj. Iom ŝerce, sed ne tro multe, abbé Pierre akcentis, ke liaj "chiffoniers" (ĉifonkolektistoj) plenumas ankaŭ kontraŭpolucian agadon, kiun oni povas nomi ekologian; almenaŭ en Francujo, kie ili estas tre nombraj.
La Emausaj komunumoj estas absolute nekonfesiaj: multaj el iliaj membroj apartenas al protestantaj sektoj aŭ al muzulmana religio. Tiuj, kiuj sin dediĉas plene al la komunumo estas kutime fraŭloj, sed abundas ankaŭ viroj kun edzino kaj filoj. La aktiveco de abbé Pierre nek estas, nek volas esti politika. Politika celo - laŭ lia deklaro, marŝas sur tute alia vojo.

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

| | |
|---|---|
| *Quota di abbonamento L.* | **1500** |
| *Abonkotizo* | *italliroj* **1500** |

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE